La 16an de Septembro, matene, tria laborkunsido prezidata de la vigla Prezidanto de la O.K.K. S-ro Jiménez, kaj, kiam ĝi finiĝis, ĉiuj kongresanoj iris al la palaco de la Provinca Deputitaro, kie oni honorigis ilin per grandioza Muzikfesto fare de "Orfeón Ovetense" (Ĥoro el cent voĉoj de gekantistoj), kiuj faris la plezuron de la kongresanaro per la plej belaj popolkantoj de la Astura Folkloro. Dum paŭzo de la Festo, oni ornamis la esperantistajn flagojn kaj tiun de la Ĥoraro per silkaj verdaj ru-bandoj rememorigantaj la Kongreson de Oviedo. S-ro Maynar, en la nomo de la esperantistoj, elokvente kaj bonhumore dankis la asturojn pro tiu bela Festo. S-ro Luis García Fernández, de la O.K.K. proklamis tie la premiitajn Lernejojn el tiuj konkursintaj en la Ekspozicio de Slojdoj…

Posttagemeze Fakaj kunvenoj: Astura Esperantista Federacio, Hispana Fervojista Esperantista ligo, kaj parolado de la eminenta samideano Emilio Herrera pri lia vojaĝo al Ameriko per Zeppelino, kiun la parolanto ilustris per lumbildoj. Tre interesa prelego!

La sekvan tagon estis peraŭtobusa tuttaga ekskurso de la kongresanaro al Villaviciosa, Mirador del Fito, Cangas de Onís, Covadonga, Infiesto…

La 18an de Septembro, lasta kongrestago, la kongresanoj frumatene vojaĝis pertrajne al la proksima tre grava industria urbo Gijón, en kies stacidomo atendis la geesperantistoj de tiu urbo kun siaj elstaraj gvidantoj pastro Fournier, kaj la inĝenieroj Menéndez Rúa kaj Castro. Alvenintoj kaj akceptintoj kuniris manifestacie kun verdaj standardoj ĝis la Urbodomo, kie oni lasis la flagojn por iri al la malnova haveno, kie ĉiuj enŝipiĝis kaj marekskurse iris por viziti la modernan kaj ampleksan havenon "Musel", kies Direktoro estis la elstara esperantisto Inĝeniero Eduardo de Castro, kiu klarigis al la kongresanoj la signifon kaj utilon de ĉiu instalaĵo. Tuj poste, elŝipiĝinte, per grandaj, luksaj aŭtobusoj oni vizitis la ĉirkaŭaĵojn de Gijón kaj la proksiman marbordon. Je la tagmezo, komuna tagmanĝo en la Parko Somió, kies menuo konsistis precipe el tipaj manĝaĵoj, kaj inter ili la fama "fabada" (fazeoloj, kolbaso kaj ŝinko), kiu sufiĉe superŝutita de bongusta cidro faris la plezuron de la gekongresanoj.

En tiu sama loko oni legis kaj aprobis la konkludojn de la Kongreso, kaj poste:

Kiam tiu labortagmanĝo estis finita, ĉiuj kongresanoj kuniris al la Urbodomo, kie okazis la solena Fermo de la Kongreso, kiun prezidis Lia Reĝida Moŝto Jaime de Borbón, Provincaj kaj Urbaj Aŭtoritatuloj kaj Prezidanto de Astura esperantista Federacio Antonio Jiménez Mora. Post la protokolaj paroladetoj de la Fermo, la Urbestro de Gijón regalis la gekongresanojn per bongusta lunĉo en alia salono de la Urbodomo. Poste, per samaj aŭtobusoj, vizitado de la stratoj de Gijón, la Popola Ateneo, la Mara Klubo, ktp. Tiu promenado, estis la lasta Programero de la Kongreso, kaj post ĝi, multaj kongresanoj foriris trajne al Oviedo por reiri hejmen.

Ekster la Kongreso, samideanoj el Madrido kaj Andaluzio, akompanis samideanon Francisco Azorín al la Popoldomo de Gijón, kie li faris belegan paroladon pri Esperanto, por la laboristaro.

Eble en tiu akto partoprenis esperantistoj de Gijón kiuj sin tenis, dum tiuj tagoj, marĝene de la esperantista festado okazinta en Asturio kaj en tiu-ĉi urbo mem. Verdire, tio estas nur supozo, ĉar ni ne disponas je informo pri tio. Sed ne povas ne surprizi nin la fakto ke el la esperantistaro de nia urbo, tiuj kiuj akceptis la kongresanaron kaj rilatis kun ĝi estis nur elstaraj samideanoj kiel Menéndez Rúa kaj la pastro Fournier, t.e. perantoj de la unua kaj la kvara E-rondoj fonditaj en nia urbo (**Astura Esperanta Asocio** kaj **Ĥiĥona Espero**) kaj neniu el la aliaj du E-grupoj, t.e. tiuj kiuj havis sian sidejon en la Laborista Ateneo. Kaj ni scias ke almenaŭ unu el ili, kaj eble la du, daŭre funkciadis dum tiuj jaroj. Eble la kialo de tiu ne-akordo estis tiu situacio de dividiĝo kaj polemiko tiam ekzistanta en la sino de la hispana esperantista movado.

Fakte, dum la jaroj kiuj restis ĝis la komenciĝo de la hispana civilmilito, la malakordo, streĉiĝo kaj kvereloj en la esperantistaj vicoj de nia lando estis konstanta kaj kreskanta. La kaŭzo de tiu interfrontiĝo, ŝajne, estis malakordo pri la maniero organizi la E-movadon en Hispanio. Sed tiu malakordo estis nur reflekto de la socia situacio de la lando. Nur kvar monatojn post la Kongreso de Oviedo, la diktatoro Primo-de-Rivera sin sentis devigita demisii, kaj la monarkio mem restis tre malfortigita. Fine de la jaro 1930 okazis iu militista ribelo kontraŭ la monarkio. La ribelo estis sufokita kaj la ribelintaj oficiroj estis leĝe kondamnitaj al morto per fusilado; la monarkia reĝimo restis mort-vundita. En aprilo de la sekva jaro okazis en Hispanio balotado por elekti la urbajn kaj municipajn konsilantarojn. La fakto ke en la grandaj urboj de la lando venkis la kandidataroj de la respublikanoj montris ke la Reĝo ne disponis je civitana apogo. Estis starigita Respubliko, sed ankaŭ ne tiu reĝimo ĝuis je stabileco. Iomete pli ol unu jaro post la starigo de la Respubliko estis provo de militista puĉo kontraŭ ĝi. La puĉo fiaskis sed iompostiom konkretiĝis procezo de evoluado al faŝismo laŭ la skemo de la taktikoj de la naziistoj en Germanio kaj Aŭstrio. Kiel reago al tiu procezo okazis proleta revolucio kiu komence sukcesis nur en Asturio, sed poste ĝi estis sufokita kaj okazis granda masakrado de revoluciuloj. Rezulte de nova baloto, en februaro de la jaro 1936, la Maldekstraro reakiris la politikan povon, sed post kromajn kvin monatojn, en Julio de la jaro 1936 okazis nova militista puĉo, ĉi-foje sukcesa. Sed la sukceso ne estis kompleta; en kelkaj regionoj la ribelo tute fiaskis, kaj tiele Hispanio restis dividita en du partojn preskaŭ egalaj en kio rilatas al loĝantaro, teritoria amplekso, ekonomiaj rimedoj kaj militista forto. La scenejo estis preta por nova interfrata milito inter la hispanoj. Tiele komenciĝis nova periodo de la historio de Hispanio, kiu estas ankaŭ nova periodo de nia esperantista historio.